Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 12an de aŭgusto 2010 per Skype.

(Aprobita la 9an de septembro 2010.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim (ĝis fino de punkto 4)
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Asbjørn Lindh en Oslo
Geir Arne Paulsen en Tromsø
Eli Eriksen Fitjar en Töreboda
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 14an de junio 2010

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio.

3. Jarkalkulo pri 2009

La estraro tralaboris la jarkalkulon kaj la kasisto finlaboros ĝin.

4. Jarraporto pri 2009.

La jarraporto ankaraŭ ne estas preta.
Eli Fitjar kaj Ingebjørg Rambjør kunlaboros pri ĝi venontsemajne.

5. Proponita eldonado de nova lernolibro

Bjørn Øyen proponis eldoni norveglingvan tradukon de lernolibro, sed kondiĉo de la aŭtoro estas ke NEL aĉetu 200 ekzemplerojn.
La estraro ne povas subteni la proponon ekonomie aŭ homforte.
Ulf Lunde kontaktos Bjørn Øyen.

6. Progreso de la planado de Landa Kongreso 2011

Geir Arne Paulsen raportis pri la laboro, kaj Ulf Lunde faros noticon pri la planoj por Norvega Esperantisto.

7. Eventualaĵoj

Propono pri "momsfritak"
Ni diskutis la ŝtatan/ministraran proponon pri «refundert moms ved kjøp av varer: for idretten og frivillige organisasjoner». Anne Karin Bonde pluesploros la proponon.

La biblioteko
La estraro ne volas lokigi amason da libroj en Esperantonia, sed volas ke kiel eble plej multaj el la libroj estu sendotaj al la Nacia Biblioteko en Mo i Rana. Tamen, se temas pri specialaj, valoraj libroj, ni devas mem konservi ilin.
Fine, granda aplaŭdo al la personoj kiuj multe laboras pri tiu afero.

Nova broŝuro
La estraro decidis reeldoni la faldbroŝuron.
Ulf Lunde kontaktos Douglas Draper pri praktikaĵoj.

Venontaj interkonsiliĝoj
Reviziitaj datoj por 2010:
7 de oktobro
4 de novembro
9 de decembro

La interkonsiliĝo daŭris inter 19.40 ĝis 22.00.

Raportis Ingebjørg Rambjør
sekretario